La fina venko – ludoteoria modelo

Reinhard Selten

Universitato de Bielefeld

Mi lernis Esperanton preskaŭ antaŭ kvindek jaroj, kaj tio estis la unua nedenaska lingvo kiun mi vere povis paroli, skribi kaj legi. Poste mi ankaŭ gajnis sufiĉe da scio de la angla lingvo, kaj mi ja bezonis tion en mia scienca kariero ĉar hodiaŭ ĉiu sciencisto en la tuta mondo devas, se li volas internacie konkuri, skribi en la angla lingvo. Do necesas ke oni elspezu multe da forto kaj diligento por provi esti sufiĉe flua en la angla lingvo. Tamen oni neniam atingas la nivelon de denaskaj parolantoj de la angla, kaj tio estas la plej granda malavantaĝo. Ne estas ke oni devas elspezi tiom da fortoj por lerni tion, tio ja estas ne daŭra afero, sed tamen oni ja ne atingas tiun bonan nivelon. Ankaŭ se oni aŭdas min paroli en la angla lingvo oni de kilometro jam scias ke mi estas germano.

La rolo de la angla lingvo nun estas tre forta. Kial tiel estas? Mi kune kun Jonathan Pool faris iun ludoteorian modelon pri lernado de fremdaj lingvoj. Kial homoj lernas fremdajn lingvojn? Ni pensis ke por la plej multaj homoj rolas unuavice ekonomiaj kialoj. Unue ni pensis ke per lernado de fremda lingvo oni eble volas atingi la plej grandan nombron de homoj kiujn oni aliel ne povas atingi. Sed nur supraĵa rigardo de la faktaj nombroj konvinkis nin ke ne estas la nombro de homoj kiujn oni volas atingi, sed la nombro de la dolaroj. Estas la lingvokomununa enspezo kiu gravas. En tiu rilato nun la angla mondo havas evidente tre gravan pozicion, kaj tiu grava ekonomia pozicio altiras lernantojn. Sed ne nur estas tio, ĉar se iu lingvo estas lernata, kiel dua lingvo, de tre multaj homoj – kaj nuntempe jam la angla verŝajne estas la plej vaste lernata dua lingvo – tiam per lernado de la angla vi atingas ja ĉiujn kiuj lernis la anglan kiel duan lingvon. Kaj tiu fakto stabiligas iun mondlingvon etnan, eĉ super tiu stato de historio en kiu ĝi estas ekonomie pli forta. Tio okazis ankaŭ kun la franca antaŭe, kiun oni rigardis kiel la ununuran mondlingvon – eĉ en la tempo de Nitobe, kiel ni aŭdis.

Sed mi kredas ke tiu pozicio de la angla ne estas eterna. Eble kelkaj homoj, kiuj hodiaŭ pensas tiel, ekvidos jam dum sia vivo ke la realo estas alia, ĉar jam aliaj ekonomiaj fortoj ekestas en la mondo. En Azio estas tre granda potencialo de ekonomia kresko, kaj eble iu azia lingvo ankaŭ kreskos en signifo – la ĉina eble, se ili povas fari ion por simpligi la skribsistemon, kiel ili jam provis. Sed mi eĉ kuraĝas esperi ke la venonta mondlingvo estos Esperanto.

Kial mi povas esperi tion? Ofte homoj diras al mi ke tio ja estas tute utopia vidpunkto; oni ne povas atendi tion. Mi estas iom pli optimisma pri tio, ĉar oni ja pli kaj pli vidas en la eksperimentoj kiujn oni menciis, ke lerni Esperanton estas ekonomie racie, eĉ por individuo en iu mondo kie la angla estas plej forta, ĉar lerni Esperanton kaj poste alian lingvon estas pli malmultekoste ol lerni la fremdan lingvon tuj. Mi ne diras ke tio estas pruvita, ĉar miaopinie estas nesufiĉa nombro da eksperimentoj por tio – sed estas indikoj en tiu direkto. Do, se oni kredas je iu minimumo de ekonomia racio, tiam pli kaj pli da homoj povos ŝpari tempon kaj fortojn lernante Esperanton unue, kaj poste la anglan. Se sufiĉe multaj personoj faros tion, tiam Esperanto gajnos finfine. Ĉar venos la tempo kiam la homoj rimarkos ke ne plu necesas lerni la anglan, ĉar Esperanto jam sufiĉas por iliaj celoj. Tial mi estas iom pli optimisma.